Friedrich Schiller,

## An die Freude

Freude, schöner Götterfunken,
Tochter aus Elysium,
Wir betreten feuertrunken,
Himmlische, dein Heiligtum.
Deine Zauber binden wieder,
Was die Mode streng geteilt;
Alle Menschen werden Brüder,
Wo dein sanfter Flügel weilt.

Chor:
Seid umschlungen, Millionen!
Diesen Kuß der ganzen Welt!
Brüder - überm Sternenzelt
Muß ein lieber Vater wohnen.

Wem der große Wurf gelungen,
Eines Freundes Freund zu sein,
Wer ein holdes Weib errungen,
Mische seinen Jubel ein!
Ja - wer auch nur eine Seele
Sein nennt auf dem Erdenrund!
Und wer's nie gekonnt, der stehle
Weinend sich aus diesem Bund.

Chor:
Was den großen Ring bewohnet,
Huldige der Sympathie!
Zu den Sternen leitet sie,
Wo der Unbekannte thronet.

Freude trinken alle Wesen
An den Brüsten der Natur;
Alle Guten, alle Bösen
Folgen ihrer Rosenspur.
Küsse gab sie uns und Reben,
Einen Freund, geprüft im Tod;
Wollust ward dem Wurm gegeben,
Und der Cherub steht vor Gott.

...

Friedrich Schiller,

## Al la ĝojo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Ĝoj'! Fajrero belradia!
Elizea di-filin'!
fajrebrie ni al via
templo iras, preĝi vin.
Ĉesu, de vi sorĉligate
de l' rigora mod' la ŝir',
ĉiuj homoj sentas frate,
se vi ŝirmas per flugil'.

Ĥoro:
Jen brakumoj al milmiloj,
Jen ĉi kis' al tuta mond'!
Fratoj! super stela rond'
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis
kaj amikon gajnis vi,
se virina am' vin ravis:
Vin enmiksu kun ĝojkri'!
Jes, se eĉ nur unu koro
estas via en la mond'!
Kaj se ne – do vin kun ploro
ŝtelu for el nia mond'.

Ĥoro:
Ĉiu sub ĉielo glata
donu sin al simpati',
al la steloj gvidas ĝi,
kie tronas Nekonata.

Ĉiu sur la brust' Natura
suĉas sukon de la ĝoj'
kor' malbona, koro pura
sekvas ŝin laŭ roza voj'.
Ŝi vinberojn, kisojn donas
kaj amikon sen pridub',
en volupt' la vermo dronas,
vidas Dion la kerub'.

...

Friedrich Schiller,

## Al la ĝojo

*tradukita de Joachim Gießner*

Ĝojo! Vi fajrero dia,
d'Elize' filino vi!
En sanktej' benita via
arde vin omaĝas ni.
Sorĉe ligas vi beate,
se disigis malraci'.
Hom' al hom' estiĝas frate,
kie milde regas vi.

.....
.......................
.......................
.......................
.......................

Kiu de amik' fidela
nomas sin amik' de li,
kiu kun edzin' anĝela
vivas, jubiladu pli,
eĉ, se nur al unu koro
ie ligas lin inklin'.
Sed aliaj ja kun ploro
el la lig' forŝtelu sin.

.....
.......................
.......................
.......................
.......................

.......................
.......................
.......................
.......................
.......................
.......................
.......................

...

| | | |
|---|---|---|
| Chor: | Ĥoro: | ..... |
| Ihr stürzt nieder, Millionen? | Ĉu genuas vi, milmiloj? | ....................... |
| Ahnest du den Schöpfer, Welt? | Vi kreinton sentas, mond'? | ....................... |
| Such' ihn überm Sternenzelt! | Serĉu super stela rond', | ....................... |
| Über Sternen muß er wohnen. | loĝas Li trans astro-briloj! | ....................... |
| | | |
| Freude heißt die starke Feder | En eterno de l' Naturo | Ĝojo estas la risorto |
| In der ewigen Natur. | Ĝojo estas la risort'. | en eterna la natur'. |
| Freude, Freude treibt die Räder | En la mondhorloĝ' por kuro | Ĝojo jen per sia forto |
| In der großen Weltenuhr. | radojn pelas ŝia fort'. | movas l'universon nur. |
| Blumen lockt sie aus den Keimen, | Ŝi el ĝermoj logas berojn, | Florojn el burĝonoj logas, |
| Sonnen aus dem Firmament, | sunojn regas ŝia gvid' | sunojn, astrojn puŝas ĝi. |
| Sphären rollt sie in den Räumen, | Ŝi tra l' spaco rulas sferojn | Sferojn forajn ĝi apogas |
| Die des Sehers Rohr nicht kennt. | trans la astronoma vid'. | en senfina galaksi'. |
| | | |
| Chor: | Ĥoro: | ..... |
| Froh, wie seine Sonnen fliegen | Kiel sur la pompaj vojoj | ....................... |
| Durch des Himmel prächt'gen Plan, | sunoj sur la firmament', | ....................... |
| Wandelt, Brüder, eure Bahn, | gaje marŝu, frata gent', | ....................... |
| Freudig, wie ein Held zu Siegen. | kiel venki la herooj! | ....................... |
| | | |
| Aus der Wahrheit Feuerspiegel | Esploriston ŝi alridas | ....................... |
| Lächelt sie den Forscher an. | el la fajrspegul' de l' Ver', | ....................... |
| Zu der Tugend steilem Hügel | sur krutaĵ' de l' Virto gvidas | ....................... |
| Leitet sie des Dulders Bahn. | ŝi la homon de toler', | ....................... |
| Auf des Glaubens Sonnenberge | sur Kred-Monto sunobrila | ....................... |
| Sieht man ihre Fahnen wehn, | flirtas ŝia flag' el or', | ....................... |
| Durch den Riss gesprengter Särge | ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila | ....................... |
| Sie im Chor der Engel stehn. | vidas ni en anĝel-ĥor'. | |
| | | |
| Chor: | Ĥoro: | ..... |
| Duldet mutig, Millionen! | Ho toleron, paciencon, | ....................... |
| Duldet für die bessre Welt! | fratoj, por pli bona mond'! | ....................... |
| Droben überm Sternenzelt | Donos super stela rond' | ....................... |
| Wird ein großer Gott belohnen. | granda Dio rekompencon! | ....................... |
| | | |
| Göttern kann man nicht vergelten; | Ĉu pripagi diojn? Vanto! | ....................... |
| Schön ist's, ihnen gleich zu sein. | Ĉu simili? Bela pen'! | ....................... |
| Gram und Armut soll sich melden, | Venu ĝoji kun ĝojanto | ....................... |
| Mit den Frohen sich erfreun. | la mizero, la ĉagren'. | ....................... |
| Groll und Rache sei vergessen, | Venĝ'? Kolero? En forgeson! | ....................... |
| Unserm Todfeind sei verziehn. | Jen pardon' al malamik'! | ....................... |
| Keine Träne soll ihn pressen, | Liaj larmoj havu ĉeson, | ....................... |
| Keine Reue nage ihn | lin ne boru pento-pik'. | |
| | | |
| ... | ... | ... |

| | | |
|---|---|---|
| Chor: | Ĥoro: | ..... |
| Unser Schuldbuch sei vernichtet! | En ŝuldlibroj plu nenio! | ....................... |
| Ausgesöhnt die ganze Welt! | Mondon regu harmoni'! | ....................... |
| Brüder - überm Sternenzelt | Fratoj! Kiel juĝis vi, | ....................... |
| Richtet Gott, wie wir gerichtet. | tiel juĝos pri vi Dio! | ....................... |
| | | |
| Freude sprudelt in Pokalen, | Ĝojo ŝaŭmas en pokaloj, | ....................... |
| In der Traube goldnem Blut | en orsango de l' vinber', | ....................... |
| Trinken Sanftmut Kannibalen, | mildon trinkas kanibaloj, | ....................... |
| Die Verzweiflung Heldenmut - - | heroecon malesper'. | ....................... |
| Brüder, fliegt von euren Sitzen, | Se rondiras la botelo, | ....................... |
| Wenn der volle Römer kreist, | fratoj, saltu el la sid', | ....................... |
| Laßt den Schaum zum Himmel spritzen: | ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo: | ....................... |
| Dieses Glas dem guten Geist! | Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'! | |
| | | |
| Chor: | Ĥoro: | ..... |
| Den der Sterne Wirbel loben, | Himnas Lin abismo stela, | ....................... |
| Den des Seraphs Hymne preist, | serafar' kun glora cit'. | ....................... |
| Dieses Glas dem guten Geist | Jen ĉi glas' por Bon-Spirit', | ....................... |
| Überm Sternenzelt dort oben! | supre, trans la tend' ĉiela! | ....................... |
| | | |
| Festen Mut in schwerem Leiden, | En suferoj: firma forto, | ....................... |
| Hilfe, wo die Unschuld weint, | al senhelpaj: ŝirma brust', | ....................... |
| Ewigkeit geschwornen Eiden, | eternec' al ĵura vorto, | ....................... |
| Wahrheit gegen Freund und Feind, | eĉ al malamiko: just'. | ....................... |
| Männerstolz vor Königsthronen, - | Virfiero kontraŭ tronoj, | ....................... |
| Brüder, gält' es Gut und Blut - | kvankam sangon kostu spit', | ....................... |
| Dem Verdienste seine Kronen, | al merito estu kronoj, | ....................... |
| Untergang der Lügenbrut! | kaj pereo al insid'! | |
| | | |
| Chor: | Ĥoro: | ..... |
| Schließt den heil'gen Zirkel dichter, | Fermu vin en sankta rondo, | ....................... |
| Schwört bei diesem goldnen Wein, | Ĵuru do kun glaso-lev', | ....................... |
| Dem Gelübde treu zu sein, | pri l' fidelo al la Dev', | ....................... |
| Schwört es bei dem Sternenrichter! | je l' Reganto de l' Stel-Mondo! | ....................... |

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805).*

*Arg-133-262 (2004-01-16 21:17:16)*

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de* FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* KÁLMÁN KALOCSAY *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976) en 1958.*

*Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)*

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de* FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-133-889 (2008-02-27 19:35:47)*